

Je la vizito en la Eŭropa Parlamento de Nelson Mandela 1990 ili kontraŭis la kunlaboron kun N.M.; se mi ne eraras, Marco Taradash kunlaboras kun Berlusconi (Italio).

Krome Emma Bonino, ankaŭ apartenante al la PR kaj nuna komisario en la Eŭropa Unio, forte protestas kontraŭ Kanado, teninte la hispanajn fiŝistojn, kiuj kontraŭleĝe elfiŝis la regionon antaŭ Newfoundland, Kanado. Verŝajne Vi scias, ke ili ne nur uzis tro grandan retegon, sed krome uzis maŝojn kiuj estis tro malgrandaj - finfine ili fraŭdas uzinte duoblan reton, la interna havante multe tro malgrandajn maŝojn - kaj uzante duoblan librotenanadon.

Pere de tio ili elfiŝis ankoraŭ nefekundajn fiŝojn, ekz-e la Nigran Hipogloson. Kun tiaj homoj, kiuj subtenas la ekologian detruon de la maroj, mi ne pretas kunlabori. Necesas ke ĉiuj maraj regionoj estos sub internacia leĝo kaj kontrolo.

#### Daŭrigebla evoluo:

La germana Ligo de la Kemia Industrio (VCI) nun konfesas je daŭrigebla evoluo en la ekonomia, ekologia kaj socia senco. Mi opinias, ke tio estas progreso en la ĝusta direkto. Ni devos atenti, kion la kemia industrio faros. (Mi mem estas kemiisto en kemia-farmacia entrepreno)

#### Genteknikaj esploroj:

Ne nur en Germanio la (bio)kemia aŭ genteknika industrio (Vander Have, Hoechst/Schering, ..) volas eksperimenti en subĉielaj kampoj kun genteknike ŝanĝita maizo kiu estos rezista kontraŭ la herbicido "BASTA", kiu detruas ĉiujn herbojn kaj ankaŭ "normalan" maizon.

Ni Verduloj, kaj aliaj civitanoj, vidas grandajn, neatenditajn sekvojn:  
- Interagoj inter la transmissiita kaj la normala hereda informo;  
- Ebla disdono de la novaj DNA-sekvencoj (de la nova hereda informo) al aliaj herboj kaj mikroorganismoj (jam montrita ĉe rafanistro);  
- Neinvertigebajn ŝanĝigojn rilate al aliaj malsanoj ĉe plantoj kaj ĉe la konsumantoj.

Kompreneble ankaŭ la uzado de totala herbicido kiel BASTA devas esti pripensata - jam multaj pesticidoj troviĝas en la trinkakvo ! Laŭ mi tio ne sekvas al daŭrigebla ekologia evoluo !

Ni uzas nun la eblecon skribi kontraŭdiri - do, necesos nova diskuto.

#### Tibeto:

Kiel sekretario de AVE kaj leganto de Tutmonda Scienco kaj Tekniko mi sendis artikolon pri la ekologiaj sekvoj de la ĝis nun 50%-a forhako de la tibeta arbaro - kun ĉaptiro pri la historia evoluo de la oficiala arbaroprotekto en Germanio. La plej granda parto konsistas el artikolo, kion verkis Christian Lavarenne.

Nun mi esperas, ke la artikolo povos aperi en TST. Pro tio mi ellasis la politikajn vidpunktojn. Krome mi esperas, ke la redaktoro, nia samideano Shen Chenru, ne havos problemojn, se la artikolo aperos.

#### Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) - materialoj:

Niaj Celoj (kun organizaj informoj), 1 p-o, (senkosta);  
Faldfolio (Kial Esperanto estas la lingvo por la Verduloj), 2 p-oj, en la angla, franca, germana, nederlanda kaj pola, (senkosta);  
Programaj Gvidlinioj de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj, 16 p-oj, (3 irk-oj aŭ 6 nlg-oj, se eblas);  
VERDire (ekologiisma gazeto en Esperanto) - provnumerojn petu de J.C. Thumerelle, Rue Pierre de Simpel 10, B-7784 Warneton.

AVE estas fakgrupo, kunlaboranta kun UEA. Kunlaboro kun SAT en diskuto. UEA-Konto (por donacoj aŭ mendoj al AVE & libervola AVE-kotizo): avex-z Sekretario: Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen. e-poŝto: Till\_Westermayer@fr.maus.de (bonvolu uzi ASCII-tekston. c+x..)



# AVENO 12

Asocio de Verduloj Esperantistaj

marto 1995

Karaj ge-AVE-anoj,  
karaj ge-samideanoj,

mi salutas Vin kaj bondeziras okaze de la diversaj religiaj aŭ simple naturorilataj sezonaj (printempaj aŭ aŭtunaj) festoj. Al la diversaj senpacaj regionoj de la tero (... , .....) mi nur povas deziri, ke la riĉaj kaj armlhavaj fortuloj agnosku la vivorajton de la malpli fortaj uloj (indiĝenoj kie ajn ili vivas).

Ĝ: Pri AVE, pri Aral-Mar, invitilo al ETNA-forumo.

Ĉi tiu numero ankaŭ estos por informi Esperantistojn - ne anoj de AVE - kies adresojn mi ricevis helpe de Andrzej Zwawa. Se Vi ankoraŭ ne estas membro de AVE kaj aktivas (aŭ almenaŭ estas membro) en

iu Partio Verda aŭ Grupo Ekologiisma Vi estas invitata membriĝi ĉe AVE. Mi petas Vin, iomete informi nin pri Via ĉefa temo kaj grupo/partio en kiu Vi aktivas.

Krome mi petas Vian informon, ĉu Via adreso estu publikigota en la AVE-listo de interŝanĝemuloj - se ne, Via adreso restos en mia "oficejo". Membro-kotizo ĝis nun ne necesas; mi/VERDire ĝojus pri verd-politikaj informoj el Via urbo kaj lando. AVENO aperas ĉ. 2-foje jare; AVE ĉefe estas informa reto de ekologiismaj samideanoj.

La aktuala stato de AVE: Ni estas 72 membroj el Aŭstralio, Brazilio, Eŭropo, Japanio, Kanado. La Eŭropaj Verduloj (ĉirkaŭ 27 Verdaj Partioj) nun agnoskis nin kiel kunlaborantoj.

#### INVITO al AVE-Kunvenoj:

*mi ĝojus renkonti kun Vi, Via Janfred*

Kunveno de AVE okaze de la 2-a Eŭrop-Unia Kongreso: Ĝi okazos je Pentekosto (2a-6a de junio '95) en Parizo. Ni renkontiĝos sabate je la 17-18a.

#### Kunveno de AVE okaze de la UEA-kongreso '95:

La 80-a UEA-kongreso okazos je 22a-29a de julio '95 en Tampere (Finnlando). Mi invitas Vin partopreni nian AVE-diskuttrondon en Tampere. Ni havos materialon (vidu sube) kaj povos certe disdoni faldfoliojn. Kiu pretas skribi tekston por niaj esperantistaj gesamideanoj ? Tiu teksto devus klarigi, kial ekologia sinteno - ene de verda partio aŭ ene de neregistara organizo - estas necesa kaj ebla agad-kampo ankaŭ por la ĝis nun neŭtralaj Esperantistoj.

Jukka el Tampere estis preta kontakti kun Pekka Sauri (Estrarano (vira parolanto) de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj), kiu vivas en Helsinki. Jukka petos lin viziti nian diskuttrondon aŭ postan interparoladon - se necesas en la angla lingvo.

#### Ĝenerale mi opinias ke ni diskutu je tiuj kunvenoj pri:

- Uzado de Esperanto kiel komunikilo inter la Verdaj Parti(an)oj.
- Informado pri ekologio en Esperantujo.
- Kunlaboro uzante la Esperanto-reton, ekz-e favore al la Aral-Mar.
- Kompreneble Vi proponus pliajn temojn, pri kiuj Vi ŝatas kune agadi.

Por mi, kiel sekretario, tiuj du kunvenoj gravas preskaŭ same. Certe ne ĉiuj AVE-anoj vizitos ambaŭ kunvenojn. La kunven-raporto de la Eŭropa kunveno en Parizo estos unu el la punktoj por la kunveno en Tampere. Mi scias, ke plejmulto de ni jam agadas en diversaj kampoj kaj nek havas fortojn nek tempon por plia agado. Tamen la kunvenoj estos bona okazo preparoli la diversajn agadojn.

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) invitis nin, prezenti AVE-n je la SAT-kongreso (15-22 de Julio) en Maribor, Slovenio. Kostoj estas por aliĝo 390, loĝado 500, manĝado 360 frf-oj. Mi ne povas aliĝi al Maribor, tamen mi esperas ke ni (mi kaj espereble ankaŭ kelkaj de Vi) povos partopreni la SAT-kongreson 1996 (versajne en St. Peterburgo).

#### La Monda Sociala Pinto:

(Pri la Klimato-Pinto en AVENO 13)

Certe Vi ricevis informojn pri la rezulto de la pinto; do, mi nur informos pri la opinio de la Verduloj en la Eŭropa Parlamento, kiuj krome kritikis la konduton de la EU-ŝtatoj:

- Atenti pri la influo de WTO/GATT (Monda Merkat-Organizo / Traktato pri Internaciaj Komercaj Tarifoj (ne nur doganoj, sed ankaŭ aliaj merkatarbaroj)) al la sociala evoluo; kaj doni kompenson al la viktimoj.
- Monda Banko kaj IMF (Internacia Valuta Fonduso) devus esti reviziota por konsideri influon al la celoj de sociala evoluo.
- Redukto aŭ nuligo de ŝuldoj favore al la evoluigantaj landoj respektive al la plej malriĉaj.
- Observi la aktivecojn de transnaciaj entreprenoj surbaze de nova konduto-kodo.
- Akcepti la kondiĉojn de ILO (Internacia Labor-Organizo).
- Akcepti la 20/20 koncepton: la riĉaj landoj dediĉu 20%-oj de sia evoluhelpo por socialaj celoj en evoluaj landoj; la ricevantaj landoj dediĉu 20%-ojn de la ricevata helpo por socialaj programoj.

La Neregistaraj Organizo diskutis pri alternativa deklaro de principoj. Mi havas skizon de 12 temoj kaj de kondiĉoj sur diversaj niveloj (komunuma ĝis internacia), sed ne la finan version. Se iu ĝin havas, kaj emas traduki, bv. kontaktiĝi VERDire-n aŭ AVE-n pro ebla publikigo.

#### Opinio de la sekretario:

Je la sociala pinto oni parolas pri riĉeco kontraŭ malriĉeco. Laŭ mia opinio oni devus eble ankaŭ agnoski, ke indiĝenoj, kiuj vivas nature, ne bezonas la riĉaĵojn de nia (norda) civilizacio! Sed ili bezonas sian propran, sufiĉe grandan areon, kiu ne estu poluita kaj elrabita de ni (de niaj firmaoj), por eble mem evoluigi. La solan paperon, kion ili vere bezonas, estas la posed-dokumento de sia "propra" hejma regiono. Ekzemploj de popoloj aŭ regionoj: Eskimoj de norda Siberio kaj Ameriko, Yanomami kaj aliaj amerikaj "indianoj", Tibeto, Norda-Timoro, Aŭstralaj, afrikaj gentoj, Kurdoj.

Jam hodiaŭ tiu postulo estas preskaŭ ne plu plenumbla - ni devus redukti nian konsumadon je nutraĵo kaj ŝtofoj, energio, diversaj metaloj, ktp. . Kaj la homaro devus esti malpli fekunda. Tamen ni devas serĉi vojojn al daŭrigebla tutgloba vivtenado. (Tema ponto al la Klimato-Pinto).

#### Konferenco Etnoj kaj Naturo (ETNA), (Poprad, Slovakio):

Unu el la ĉefaj temoj estos enkadre de Karpata Rekontiĝo: Konservado de la natura kaj kultura heredo de Karpatoj.

Intertempe Vi versajne legis en VERDire, aŭ Monato, aŭ .. pri ĉi tiu kongreso, organizante de D-ro Lev Medvedev, Akademio de Nova Pensado, Pjatnickaja 7, RUS-113035 Moskvo; e-poŝto: soceco@glas.apc.org .

Mi konsendos informfoliojn al la plejmulto. La celo estas kontribui al la konservado kaj protekto de bonkvalito kaj diverseco de la natura kaj kultura vivmedio (de la homaro). Faka konferenco estos de 27-a ĝis 29-a de junio; Poste (ĝis la 10-a de julio) estos kulturaj aranĝoj: Folkloro

Festivalo de Vychodna; la ekumena festo de Sanktaj Cirilo kaj Metodeo, misiistoj de la slavaj popoloj; Internacia Lernejo de la Ekologia Vivmaniero; ekskursoj al la Altaj Tatroj kaj al la Slovaka Paradizo. Lingvoj: slovaka, esperanto, rusa, angla (samtempa traduko). Resumon (1 p-o ĝis 1-a de majo) artikoloj (ĝis 1-a de junio) al: Internacia Komitato ETNA'95, Popradske nab. 16, SK-05801 Poprad. e-poŝto: ETNA95@juls.savba.sk .

#### Konferenco Turismo kaj Medioprotekto (Budapesto, Hungario):

Ci tiu internacia konferenco en Esperanto okazos post la unua parto de ETNA. La temaro "ekologia turismo" nuntempe oni ankaŭ preparolas en Germanio (kaj ...). HEA organizos ĝin inter la 1-a kaj 7-a de julio. Kostoj estos por aliĝi 28 - 38 nlg-oj kaj po punkto (kun matenmanĝo) inter 7 -15 usd-oj. Hungara Esperanto Asocio, pk. 193, H-1368 Budapest, tel: (36-1)268-0306, FAX -0331 .

European Sustainable Energy Tour 1995 (Eŭropa Turneo por Daŭrigeblaj Energioj): Bruselo-Parizo-Londono-Nijmegen-Frankfurto-Prago-Vieno-Bratislavo-Kievo-Minsko-Moskvo (12a de januaro - 12 de oktobro). Temas pri piediro de 25 km tage. Organizas SNORE (Subtena Reto por Renovigebla Energio) kaj For Mother Earth (Por Patrino Tero). Okazos ekzpozicio por montri la eblecojn eviti nuklean energion. Fotovoltaiko, ventgeneratoro kaj sunkolektoroj donos la necesan energion. Informoj okcidente: Mother Earth, Zilverhof 19, B-9000 Gent, Tel: 32/9/233 32 68, FAX: /233 49 24, e-poŝto: motherearth@gn.apc.org . oriente: Mother Earth, Bubensak 6, CZ-17000 Praha 7, Tel/FAX: 42/2/667 10366, e-poŝto: ckane@ecn.gn.apc.org. Fonto: Grasshopper (no 3, '94), Slawkowska 12/24, (IVp.), PL-31-014 Krakow.

#### Informoj:

Federacio de Junaj Eŭropaj Ekologiistoj (FJEE), Rue Charles VI /12, B-1030 Bruselo, eldonis 30 paĝan broŝuron "Eŭropaj Pensoj" - en la angla, franca kaj germana.

Temoj: Eŭropo de la Regionoj, Eŭropa Unio, Mediteraneo, Oriento-Okcidento, Medi-politiko, Neregistaraj Organizo, Senlaboreco; krome artikoloj de Verdaj Junularoj el diversaj landoj kun siaj adresoj.

Mi kunportos ekzemplerojn al la pariza kunveno.

#### SOS Loire Vivante (Naussac II, Francio):

Naturprotektita grupo kiu laboras por viva kaj ne "konstruita" rivero. Planita estas diversaj akvobaroj kaj reguligoj, kiuj malhelpos la fiŝojn vivteni sin (ekz-e la salmo).

#### Kanalo Rheno-Rhono (Besancon, Francio):

Je la 2-a de aprilo estos granda demonstracio en Besancon. Oni planas ruinigon de la Doubs-valo je 100 km-oj kaj kanaligon de la Saone je 75 km-oj. La EDF planas investi 17.000 milionoj da frf-oj. Jam la kanalo de Rheno-Majno-Danubo en Germanio montras, ke ĝi ne estas necesa; nur detruis ekologian valopejzaĝon.

#### NATUROPA:

La jaro 1995 estas dediĉita "Eŭropa Jaro de Naturprotekto"; pro tio NATUROPA eldonis belan faldfolion pri la temaro. Krome ili kune organizas la agadojn ĉi-okaze en diversaj landoj.

NATUROPA-Centro estas biblioteko kaj dokumentado-centro por la landoj kiuj apartenas al la Eŭropa Konsilio; adreso: F-67075 Strasbourg Cedex, tel. 33/ 88 41 22 78, FAX: -27 15 . Ĝi estas vizitebla je interkonsento; oni parolas oficiale la anglan kaj la francan - (kaj la germanan, ...).

#### Partito Radikale / Fraŭdemaj Fiŝistoj:

Mi ricevis invitilon al la "Kampanjo por la rajto de la lingvo internacia 1995" de la Esperanto Radikala Asocio. Mi skribis pri PR jam en AVENO 10. Mi devas konfesi, ke ili estas tre aktivaj por Esperanto. Tamen mi volas averti Vin kontraŭ la Partito Radikale: